Kielvi eble scias, de kelkaj jaroj nia Federacio organizis konkurson por varbado al nia kurso. Jam plurfoje gajnis la premion Sin° NAU en MONTIGNY-lès-METZ. Dum la pasinta lernjaro, ŝi denove premiĝis! (abono al la gazeto "Monato") ŝi varbis 4 gelnantojn dum tiu jaro. La aliaj varbintoj estas P. Denis, A. Grossmann kaj F. Néel (en 51-St-Martin-sur-le-Pré). Gratulojn kaj dankon al ĉiuj!

Ni daŭrigas la konkurson kaj alvokas do al aktivuloj, kiuj deziras varbi. Mi memorigas, ke mi disponas pri cirkuleroj kaj afiŝoj pri la P-a K-o kaj pri flugfolioj pri E° por helpi al vi. Mendu al mi la deziratan kvanton.

Sekve al propono de UFE pri senpaga liverado de "Metodo 4" por disdonado baldaŭa (sekve al senpaga eldono helpe de "mecenato") ni planas amasan disdonon en Nancy (Universitato, Junuldomoj, sociaj Centroj, Urbdomoj, ktp). Ni nun atendas la materialon.

J.P. Colnot

\*\*\*\*\*

## NIAJ DONANCINTOJ EN 1988

Ni sincere dankas al la sekvantaj personoj, kies donacojn ni ricevis dum la kotizo-jaro 1988:

### Donacoj por la Federacio:

S-ino DIETZ 60 FF - S-ino STEINMETZ 40 FF - S-ro WICK 100 FF -  
Restoracio Gambrinus 2 x 24 FF  
Sume 248 FF

### Donacoj por La Informilo:

S-ro CONCESSI 40 FF - S-ino ORY 140 FF - S-ro WICK 100 FF  
Sume 300 FF

FINANCA RAPORTO ORIENTA FEDERACIO 1988	dato 28.01.1989
--	-----------------

### ENSPEZOJ FEDERACIO

1 Staĝo en Betschdorf	1960.00
93 Federaciaj membroj	1862.00
66 UFE-membroj kun pago	1119.00
5 Donacoj al Federacio	248.00
2 Rentumo resp.k sikav	1316.20
1 Vendo de materialo	17.20
1 Repago libro-servo	270.00
	-----
	6792.40

### ELSPEZOJ FEDERACIO

10 Sekretariaĵoj	736.00
4 Propagando	481.50
1 Materialo	100.00
1 Gazet-eltondaĵoj	140.00
	-----
	1457.50

### ENSPEZOJ INFORMILO

224 Abonoj al Informilo	9177.01
3 Donacoj al Informilo	300.00
	-----
	9477.01

### ELSPEZOJ INFORMILO

4 Eldono Inf.61 350 ek	2542.65
1 Eldono Inf.62 280 ek	1417.52
1 Eldono Inf.63 300 ek	1611.00
1 Eldono Inf.64 320 ek	3072.00
4 Afranko, veturkosto	518.00
4 Enlanda sendado Inf.	332.56
3 Eksterland.sendkosto	336.00
5 Materialo por Inf.	881.00
1 Bank-kostoj	17.40
1 Aliĝo al A.C.V	170.00
	-----
	10898.13


ENSPEZOJ FEDERACIO	6792.40
ELSPEZOJ FEDERACIO	1457.50
	-----
PROFITO FEDERACIO	5334.90

ENSPEZOJ INFORMILO	9477.01
ELSPEZOJ INFORMILO	10898.13
	-----
PROFITO INFORMILO	-1421.12

Havo je la 31 12 87	8574.49
PROFITO FEDERACIO	5334.90
PROFITO INFORMILO	-1421.12
	-----
Havo je la 31 12 88	12488.27

La trezoristo :  
A. Grossmann

En 1988 altiĝis iomete la nombro da abonantoj al La Informilo, sed tre verŝajne ĝi meritas multe pli. Ĉu en 1989 ni atingos aŭ eĉ superos la nombron de 250 abonantoj? Nia financa situacio estas en bona stato, kaj krome ni posedas sikavojn je 14000 F.



“same kiel ni,  
profitu  
vian Esperanton!”

\*\*\*\*\*

## SCIENCA APLIKO

### Al Pekino por lerni akupunkturon

Anonceto publikigita en la revuo *Esperanto* altiris mian atenton, ĉar mi interesigas kaj okupiĝas pri la medicina mondo. Mi do skribis al la Akademio “Sinica” de Pekino, kaj baldaŭ ricevis oficialan invitolon de la Akademio pri Scienco kaj Tekniko de Ĉinio. Mia amikino Anne-Isabelle Laplagne, kamaradino el sama liceo “Alfred Kastler” (Nobel-premiito pri fiziko kaj honora prezidanto de la Kultura Esperanto-Centro “Florival”, de la orient-franca urbo Guebwiller), estis ankaŭ interesita, kaj ni planis iri ambaŭ. Unue, ni plifirmigis nian Esperantan scion dum paskaj ferioj ĉe Kultura Esperantista Centro en La Chaux-de-Fonds (Svisio), sub la efika trejnado de profesoro Gacond, direktoro de la Centro. Ni iris ankaŭ dokumentiĝi en la franca nacia Esperanto-muzeo de Gray, kie instiganto de la muzeo, s-ano Junier, afable disponigis al ni la medicinajn dokumentojn de la biblioteko. Kaj ni senpacience atendis la tagon de la forflugo.

#### Alveno al Pekino

Post dudekhora flugo, ekde Parizo kun haltoj en Belgrado, Dubaŭ kaj Calcutta, Ĉinio troviĝis sub niaj okuloj. Pekino estas formita de rektaj avenuoj, interligitaj per vojoj, kiujn eŭropanoj taksus neireblaj pro la truoj; sed nia taksia ŝoforo ne estis ĝenita, kaj baldaŭ kondukis nin al la universitata kampo de la Akademio Sinica. Bejing estis multenombraj homoj malrapide irantaj, dum bruis akridoj en aero peza de varmo kaj humideco.

Ni miris pri la nove eltrovita mondo de la ĉinoj, kaj same la enlandanoj scivoleme rigardis nin. Senegalaj studentoj pruntedonis al ni biciklojn, kaj ni iradis kiel la pekinanoj, vizitante la urbon, la komercan straton Wang Fu Gin, kaj marŝante sur la placo Tien An Men. Ni ankaŭ vizitis la Grandan Muron, la Someran Palacon, kaj apudajn urbojn kaj vizitindaĵojn, ne forgesante aĉeti silkajn kaj ledajn vestaĵojn.

#### Piki la punkton

La akupunktura kurso okazis en lernoĉambro de la Akademio. Ni estis dudeko: geĉinoj, polinoj, sovetiano, japanino, senegalano, aŭstralianino, germano, norvegino, kaj ni du francinoj. Kvankam la tuto estis ege interesa kaj profitplena por ni, ni bedaŭris la malalt-nivelan lingvoscion Esperantan de niaj profesoroj, kaj la ĝeneralan nebonan organizon. Tamen ni volas esperi, kiel oni tion promesis al ni, ke en venontaj jaroj la kursoj estos pli bone prezentataj en internacia lingvo. Kvin profesoroj-doktoroj instruis al ni la teorion kaj praktikon de akupunkturo kaj mokso. Ankaŭ ni havis la ŝancon “piki la punktojn” sur ni mem, aŭ sur niaj kolegoj; ni eĉ sanigis polinon kaj la senegalanon. Ni iris ankaŭ en hospitalon, kie ni estis



akceptitaj de la fama profesoro Wang Xuetai, prezidanto de Centro de Esplorado pri Akupunkturo, Mokso kaj Masaĝo de Ĉinio. Ni renkontis ankaŭ la hospitalan prezidanton de la Akademio Sinica, d-ro Tang Xianghui, kaj d-ron Chen Jiying de la Kemia Instituto kaj specialisto pri la tradicia ĉina medicino.

Ni vidis kiel oni preskaŭ faras miraklojn sur kripluloj kaj lamuloj, kaj flegas plej diversajn malsanojn. La kvar-semajna staĝo finiĝis per ekzameno kaj atribuo de diplomo (pri kiu ni ĉiuj ege fieras), kaj ankaŭ per bankedo kun delikataj ĉinaj manĝoj.

#### Ambasadorino de la franca biskvitfabrikado

La dua Internacia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko, kun partopreno de pli ol 1200 sciencistoj el dudeko da landoj, postsekvis la staĝon. Ĉar mia patro estas biskvitfabrikanto, mi kunportis dokumentaron pri tiu arto, kaj okaze de komerca kaj ekonomia kunveno mi prezentis la dosieron al interesitoj. S-ro Zuo Caiyuan el provinco Hunan akceptis la dokumentojn kaj promesis esplori ĉe la registaraj instancoj ĉu estos eble konstrui biskvitfabrikon en Ĉinio. Mankas al Ĉinio devizoj, kaj oni proponis pagi per vestaĵoj aŭ aliaj varoj. Mi nun restas en rilato kun la ĉinaj amikoj, kaj mia patro same agas ĉe Franca Unuiĝo de Biskvitfabrikantoj por plu esplori la oportunecon eble krei biskvituzinon en Hunan-provinco.

#### Ĝis revido!

Anne-Isabelle kaj mi jam planas reiri al Ĉinio, tiu ensorĉa lando. Mi esperas post kelkaj jaroj plu lernadi akupunkturon en ĉina hospitalo, kaj jam povas uzi kun efiko kaj sukceso sur parencoj aŭ amikoj kiuj ne timas la malgrandajn nadlojn, kaj kiuj miregas pri rapida kaj foje mirakla rezulto. Pro tio, mi estas dankema al niaj ĉinaj amikoj.

Daniela Aminda Wermelinger (Francio)

## "MI FLUGIS AL ĈEĤOSLOVAKIO"... AŬ... "LA PROMESO!"

\*\*\*\*\*

La 24 an de Oktobro mi alflugis al Prago , post rapida flugo je 75 minutoj , la aviadilo surterigis en Prago . Trapasinte , sen problemo la multajn kontrolojn , ŝanĝinte la devigatan sunon , mi trapasis novan kontrolon , sed mi estis grable surprizita aŭdante "esperanto " mi respondis " Jes " .. pasu ĉio estas en ordo .

Unua konstato : alpinglu vian insignon , ĝi estos ofte via pasporto .

Memfarita flageto ĉe la maldekstra mano , mi tiris mian duradajn valizon per la dekstra mano , okule mi serĉis miajn leteramikojn , kiu priskribis sin tiel " blanka . barbulo kun lambastono akompanota de sinjorino tenanta ĉe la mano esperantan sakon " mi ne longe bezonis ĉirkaŭrigardi .. tuj alproksimiĝis gesamideana grupeto kiu ĉirkaŭis min , salutis min , bonvenigis min , prenis mian valizon , portanta ĝin anstataŭ tiri ĝin , la demandoj ŝprucis el ĉiuj direkttoj , mi ne plu sciis kiu estis kiu !! Finfine ni direktis nin al kafejo por gustumi kukojn kaj iomete babili . Poste, Sro Vaneček rivelis al mi la planatan programon ĝis la 26an de Oktobro .

" Vi loĝos ĉe Sro Nemeček , kiu uzos tiu tempo por vizitigi vin la "oran urbon" Pragon ". Post la vespermanĝo okazos renkontiĝo kaj vi konatiĝos kun rusaj gesamideanoj , kiuj atendas vin . "

Do , post la vespermanĝo , mi renkontis niajn rusajn gesamideanojn kaj longe babilis .

\*\*\*

Laŭ la plano , la postan tagon mi vizitis Pragon kun mia loĝanto , kaj enkapigis multajn informojn pri la tiea movado kiu estas vigla , pri la urbhistorio , pri la priskribo de monumentoj k.T.P... Mi vizitis la sidejon de la Ĉeĥa esperanta asocio . La prezidanto varme salutis min , kaj petis min transdoni al nia fédéracio siajn plej korajn salutojn , tion mi tuj faras .

Mi fotis diapozitive rimarkindaĵojn , ĉar mi promesis al la Betĉdorfa vilaĝestro prezenti Ĉeĥoslovakion ...

La 26 an de Oktobro , je la kvina matene , Sro Nemeček , kiu loĝas en la antaŭurbo de Prago , akompanis min ĝis Prago per buso , metroo , por ke mi kaptu alian aŭtobuson kiu veturigos min al Slany .

Bedaŭrinde , mia mansako malaperis kun sia enhavo "fotaparato , sonbendoj k.t.p... Adiaŭ al mia promeso !! . Ni informis tuj la policanojn , la busŝoforon , telefonis ĉie , sen sukceso , kompreneble .

Alveninte al Slany ĉe la prezidanto de la invalida sekcio mi rakontis mian nekompreneblan misaventuron , sed vojaĝo ne estos vojaĝo sen aventuro ..

En Slany mi informis kaj informiĝis pri la tiea movado . Imagu , ke tiu grupo ekstaris antaŭ tri jaroj kaj nombris 20 membrojn , la nuna grupo kaj perkoresponda kursanoj nombras 500 anojn ... Nuntempe tiu movado vastiĝas eksterlande kaj deziras labori kun francaj grupoj de invalidoj aŭ kun izolituloj .

Slany estas malgranda urbo kiu havis gravan rolon komence de husana revolucio , kaj estas centro de la maŝinkonstruado .

\*\*\*

Je kelkaj kilometroj de Slany situas LIDICE , tiu kampista komunumo akiris sian nuntempan tragikan tutmondan renomon kulpe de la senekzempla krimo , dua Oradour s/Glance , kiun je ĝi kaj ĝia loĝantaro faris en tempo de la dua mondmilito germanaj okupaciintoj de niaj landoj . Preteksto por tio estis mensoga aserto , ke la vilaĝanoj komunikis kun atencintoj je la tiel nomata substituanta regna protektoro en Bohemio kaj Moravio Heydrich , ilia fakta celo estis timigi la Ĉeĥan popolon kaj rompi ĝian reziston kontraŭ faŝismo . Nokte antaŭ la 10 an de junio 1942 ĉirkaŭis nazioj la tutan komunumon kaj antaŭ la mateniĝo ili pafmortigis 173 virinojn kaj knabojn el kiuj

la plej aĝa estis 84 jara . La plej juna ĉo ne 15 jara pluaj estis ekzekutitaj poste . Same terura estis la sorto de la virinoj , kiuj estis prirabitaj je siaj infanoj kaj transportitaj en koncentrejojn, same tiel 82 infanoj, kie ili pereis . Fine la komunumo laŭ ordono de A. Hitler estis forbruligita kaj ebenigita kaj ĝia nomo estis forstrekota... En la jaro 1955 estis fondita en Lidice Parko de Amikeco kaj Paco en ĝi nuntempe floras rozoj el la tuta mondo . Al Lidice alveturadas centmiloj da vizitantoj el ĉiuj landoj kaj kontinentoj por rememorigi al si la malbonon faritan de faŝismo kaj firmiĝi en la decido neniam plu allasi ĝian ripeton .

\*\*\*

De Slawy mi veturis al České Budojevice, kie min atendis samideaninoj , ĉefe la prezidantino de la grupo " Progreso " . Elbusiĝanta mi estis bonvenigita kvazaŭ mi estus princino !! Miaj brakoj ne plu sufiĉis por porti la donitajn florojn . Kompreneble mi tuj devis .... satmanĝi., kaj konatiĝi pri la preparita plano Mia alveno estis anoncita en la tia informilo ...tiel kiel la tutlanda renkontiĝo de E. handikapuloj , invalidoj, kiu okazis de la 1 ĝis 7a de Novembro en refreŝejo de Asocio de handikapuloj en Hodonin apud Kuňstat . Al tiu ĉi renkontiĝo partoprenos ankaŭ Sino O.S. kiu estos gasto de nia klubo lastan Oktobron lundo . Do, mi estis informita ...

Posttagmeze mi vizitis infanlernejon kie okazis infanesperanta kurso . La 15 infanoj kantis Prato Jak' honore al mi . Funkcias , ankorau tri aliaj kursoj por pli aĝaj infanoj . České Budojevice situas en sud-Bohemio . Tiu ĉefurbo havas longjaran historion. Fondis ĝin ĉeĥa reĝo Premysel Otakar la dua en la jaro 1205. La centro de la urbo estis antaŭ nelonge proklamita je urba historia memorigrezervejo. Ĝi ne nur estas administra centro de regiono sed ankaŭ industria urbo . Pezan industrio reprezentas nove konstruita entrepreno Skoda , maŝinkonstruado k.t.p... Jam tradicia estas produktado de krajonoj kaj kancelariaj bezonaĵoj en Ko- i---noor kaj mondkonata estas la biero el bierfabrikoj Samson .

Vespere mi spektis teatraĵon " Amo kaj perfido " .

\*\*\*

Lunde ni aŭtis al Trëbon kie min atendis ĉefkuracistino de la naturaj kuracmetodoj . Tiu metodo konsistas el kotargila-banoj , hidroterapio , gimnastiko . La moderna sanatorio nomata Aurora entute disponas je 30 litoj , ĝi estis fondita en Trëbon en la jaro 1915. La loka kuradado estas bazita sur sulfur-feraj torfejoj envicigeblaj inter la plej grandaj en Meza Eŭropo .

Mi daŭrigis miajn vizitojn irante al la ĉaskastelo OHRADA kiu datumas de la 16 jarcento , mirinda kastelo estas kaj vidinda . Ĉefe la salonejoj pri evoluo de arbara mastrumaĵo , arbara klerigo , mezuriloj trofeoj de la plej bonaj cervoj en kolektoj de Ohrada devenas el la 18 a jarcento de harkovrita ĉasbestaro , ĉasado de bestaro plumhava k. t.p. Pri la origina kapelo de la ĉaskastelo mi povas mencii , ke ĝi estis sanktigita al Sankta Eŭstaĉ protektanto de la ĉasistoj , la kulto de sankta Huberto estas pli nova . Korvo bekfrapanta la kapon de turko estis donita en emblemon de Schwarzenber-idoj far imperiestro Rudolfo la dua en la jaro 1599.

\*\*\*

Nun , ni alvenis al Tàbor , urbeto fondita en la jaro 1420 far husanoj . Ĝi kiel ununura urbo en Ĉeĥoslovakio estis proklamita en la jaro 1902 Nacia Kultura memorindaĵo . Tàbor estas urbo entenanta riĉecon da multnombraj historiaj vidindaĵoj rilatantaj parte al glora epoko de husanaj venkoj , kiam urba kaj landa mezeŭropa sortoj samis .

Rapide vesperiĝis , ni direktis nin al la kunveno de la Ĉeska Budojevica grupo " Progreso " .

La prezidantino bonvenigis min per varmaj vortoj , kaj resumis la agadojn de la grupo , kiu estas modelo de vicleco .... Ĉiuj membroj estis al mi prezentitaj , estis nur parĉo dela grupo ... estas la komencantoj kelkaj 30 anoj (sen la infanoj) 2a grada kaj unua grada nombras pli ol 40 , kaj la grupo kiun mi vidis , ni estis 43, 45 gesamideanoj ... Kalkulu vi-mem ... (sekvota)



(El 52p poem-kolekto en Esperanto "Kalejdoskope"  
verkis kaj ilustris Lilli Giloteaux)

La tagoj kun vi \_\_\_\_\_

La tagoj kun vi fariĝis fontano  
plena de pura matenfreŝo  
kaj retrovita juneco.

La tagoj kun vi fariĝis kalejdoskopo  
de ludeme buntaj sentoj,  
el kiuj ridis nia feliĉo.

La tagoj kun vi fariĝis kamenfajro,  
kies flustra flamo  
sekurige ĉirkaŭvolvis mian nudon.

La tagoj kun vi fariĝis incenso,  
kiun ni kune enspiris  
en silenta harmonio.



Kalejdoskope : prezo (informcele) 20F  
Giloteaux CCP LILLE 2269 89' x

## libro-katalogo



foto UFE

la tri sinsekvaj folioj, forigeblaj el la revuo, faldeblaj laŭ siaj  
medianoj, elformas nia nova libro-katalogo.

## KATALOGO DE LA LIBRO-SERVO

=== (Decembro 1988) ===

La ORIENTFRANCA KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO proponas al siaj membroj jenajn librojn

Ĉi-tiuj estas aĉetebraj en ĉiu kongreso aŭ staĝo organizata de la Federacio. Perleteraj mendoj ankaŭ eblas.

La prezoj indikataj povas iomete ŝanĝiĝi.

\*\*\*\*\*

## KLARIGO

B Bildstrio	G Geografio	R Romanoj
BI Biografio	Turismo	RG Religio
E Movado	H Historio	S Scienco
Lingvaj Studoj	I Infanlibroj	Tekniko
D Diversaĵoj	N Noveloj	T Teatraĵoj
F Fabeloj, fabeloj	Rakontoj	V Vortaroj
FZ Filozofio	P Poezio	Lernolibroj
		Legolibroj

\*\*\*\*\*

TITOLO	VERKISTO	PREZO
V Abrégé pratique de grammaire	Lentaigne	7,00 FRF
E Aktoj de la akademio (1963-1967)	U.E.A.-S.A.T.	18,00
E Aktoj de la akademio (1968-1974)	U.E.A.-S.A.T.	30,00
P Al abelujo ĝi flugas	LIIV	15,00
T Amo de Danto (la)	Trygve-Muller	38,00
N Amuleto (la)	Meyer	39,00
V Amuza legolibro	Lienhardt	45,00
S Amuza matematiko por ĝelernantoj	Arnaudov	30,00
V Amuzaj dialogoj	Lienhardt	36,00
I Anaseto kaj koketo	Huang Gjunĉan	10,00
D Angla antologio (1000-1800)	Auld	40,00
P Angoro	Piĉ	73,00
P Apenaŭ bukedeto	Bernard	45,00
B Asteriks la Gaŭlo	Gosciny	35,00
R Aŭli - Rakonto pri knabeto	Adamson	42,00
D Aŭstralia antologio	Towsey	220,00
R Aŭtuno en la printempo	Ba-Jin	40,00
R Aventuroj de L.R.M. Stultuloj (la)	Dorno	37,00
R Aventuroj de Spar kaj aliaj porketoj (la)	De ROOver	35,00
N Bagatelaro	Rosbach	34,00
N Bakŝis	Newell	73,00
P Baladoj el Asante	Latham	18,00
V Barbro kaj Eriko	Schneider	7,00

## KIAMANIERE AĈETI LIBRON PERKORESPONDE?

\*\*\*\*\*

1/ Vi redaktas vian mendon sur simpla poŝtkarto aŭ per letero. Menciuj precize la titolon de la verko(j), .....eventuale aldonu la nomon de la aŭtoro.

Memkompreneble vi ne forgesu indiki vian adreson kaj vian subskribon.

2/ Vi direktu vian mendon al

LIBRO-SERVO

12, Rue Estienne d'Orves,  
F-54490 PIENNES

3/ Vi baldaŭ ricevos la menditaj(j)n libro(j)n kun fakturo (libroprezoj + sendkostoj).

.....4/ Vi tuj pagos per poŝta ĝiro aŭ mandato aŭ bankoĉeko al la supra adreso... (se vi uzos poŝtĝirmandato: "Libroservo", CCP 2800-76 H NANCY ).

NI SENPACIENCE ATENDAS VIAJN MENDOJN!

\*\*\*\*\*



„Punch“ (Britio)

# nos cotisations 1989

*Vous venez de recevoir notre bulletin d'information sur l'espéranto, "LA INFORMILO". Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez le recevoir régulièrement (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 1989 et nous vous invitons à les payer dès maintenant.*

*Nous espérons vivement vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres!*

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national, tant dans le domaine de l'information en général que dans celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

## COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT

- 1/ Les cotisations à l'U.F.E. et à l'U.E.A. (catégories 3 et 4, colonnes encadrées) sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 855 35 D PARIS, en y joignant votre bulletin d'adhésion. Votre adhésion à notre Fédération est comprise dans les cotisations de l'UFE, si vous habitez les départements 54 55 57 67 68 88. Par contre l'abonnement à LA INFORMILO reste à payer à notre Fédération. Voir ci-après.
- 2/ La cotisation à la FEDERATION CULTURELLE DE L'EST ainsi que l'abonnement à LA INFORMILO sont à payer:
  - = de préférence par virement postal à FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO  
CCP: 1997 72 W NANCY (pratique et sans frais)
  - = par chèque bancaire à l'ordre de cette même Fédération... mais ce chèque est à envoyer à notre trésorier: A. GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- 3/ Exceptionnellement, les membres du groupe de Strasbourg sont priés de verser leur cotisation au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, CCP: 49917 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au groupe local (20), ou directement à leur trésorier, B. REIFFSTECK, 4, rue de Neuchâtel, 67000 STRASBOURG. Joindre votre bulletin d'adhésion spécifique pour les cotisations de l'UFE.

### CAT.                      TABLEAU DES COTISATIONS 1989

- 1 = abonnement simple à LA INFORMILO
- 2 = adhésion simple à la FEDERAT. CULT. DE L'EST
  - \* membre fédéral (avec abonnement à LA INFORMILO)
  - \* membre fédéral (sans " ... pour les autres membres de la famille par exemple)
- 3 = adhésion à la FEDERATION et à l'U.F.E.
  - \* membre simple
  - \* membre abonné **ACTIF** (avec la revue de l'UFE, "FRANCA ESPERANTISTO")
  - \* membre de moins de 30 ans (reçoit "KONCIZE" et
  - \* membre abonné (conjoint) "JEFO informas")
- 4 = adhésion à la FEDERATION + U.F.E. + U.E.A.
  - \* membre individuel (reçoit "F.E°" + guide de UEA)
  - \* membre individuel (reçoit "F.E°" + annuaire de UEA + revue KONTAKTO, si moins de 26 ans)
  - \* membre individuel (reçoit "F.E°" + annuaire de UEA + revue mensuelle ESPERANTO + KONTAKTO si moins de 26 ans)

cotis.	abonnem. à LA INFORM°
	42 F
2 2 F	+ 42 F
2 2	+ 42 F
2 2	+ 42 F
85	+ 42
215	+ 42
215	+ 42
110	+ 42
255	+ 42
305	+ 42
440	+ 42

### **IMPORTANT!**

- 1- Les nouveaux adhérents recevront par courrier séparé leur(s) carte(s) de membre à la Fédération, à l'UFE, à l'UEA, selon les cotisations payées ainsi qu'un exemplaire des statuts de notre Fédération.
- 2- Les autres membres trouveront dans le bulletin **La Informilo**, qui suit l'enregistrement de leurs cotisations, les coupons de l'année 1989, à coller sur les cartes de membre respectives. Les membres de l'UEA y trouveront également les coupons 1989 donnant droit au service des délégués mondiaux dont les adresses se trouvent dans l'annuaire de l'UEA.
- 3- Les membres de l'Enseignement, payant leur cotisation de l'UFE, sont invités à mentionner leur profession; ils seront ainsi inscrits d'office au **GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES GEE**.
- 4- Les jeunes de moins de 30 ans, payant leur cotisation de l'UFE, voudront bien mentionner leur date de naissance; ils seront ainsi inscrits d'office à l'**ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANÇAISE JEFO**. Ils recevront alors en plus la revue **Koncize** et le bulletin interne national **JEFO informas**.

# FAITES VIVRE VOTRE PRESSE: **abonnez-vous!**

Toutes ces revues sont entièrement rédigées en espéranto. L'abonnement est à souscrire directement auprès de

UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO

4bis, Rue de la Cerisaie, CCP 855 35 D PARIS  
75004 PARIS

ABONOJ 1989			
Brita Esperantisto	65	Hungara vivo	100
Bulteno Internacia Muzeo Wien	60	Israela Esperantisto	75
Dia Regno	65	Koncize	70
El popola Ĉinio	1 jaro 90	Kontakto	70
	2 jaroj 150	Kulturaj Kajeroj	70
	3 jaroj 210	La Juna-Amiko (4 foje-jare)	26
Ekumenismo	65	la Kancerkliniko	95
Evangeliaj Kajeroj	60	La Ponteto	22
Esperanto (11 numeroj jare)	135	Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado (LPLP)	150
Esperanto-dokumentoj (serio de 10)	110	Literatura Foiro	155
Espero el Koreujo	75	Monato	179
Espero Katolika	95	Monato (aerpoŝte)	220
Fokuso	75	+ La Jaro (poŝkalendaro de Monato)	22,50
Fonto (volumo 9)	120	- La Jaro (aerpoŝte)	28
Franca Katolika Esperantisto	30	Sciencia Revuo (2 numeroj jare)	85
Heroldo de Esperanto (18 numeroj jare)	120	Simpozio (2 foje jare)	30
		Verda Lupeo/Fenikso	50

## Autres revues diffusées par d'autres associations:

SENNACIULO (organo de SAT)	120F	monata	67, Av. Gambetta, 75020 PARIS
SAT-AMIKARO	35F	monata	1d
SENNACIECA REVUO	125F	jara	39, Rue J. Hénot, 57070 METZ
LA GAZETO (6 n°j)		(aŭ 18 "ekuoj")	"La gazeto"

## Materiel à votre disposition:

- Vous pouvez également vous procurer les affichettes éditées par notre Fédération avec 5 textes différents au format de 20x5,5 cm et de couleurs différentes, par exemple:

### ESPERANTO

Votre deuxième langue !

Prix franco: 15 affichettes à 4 F 40 affichettes à 8 F

- Ont également un grand succès des Cartes de visites qui présentent succinctement l'Espéranto. On y trouve l'adresse de l'UFE et un espace blanc vous permet de personnaliser votre envoi: Prix franco: 8 cartes 8 F, 20 cartes 16 F

## Figurent également à notre catalogue les livres suivants:

- Lexique Fondamental Espéranto-Français de R. Léger 112 pages. Prix franco: 18 F
- Amuzaj dialogoj en Esperanto de A.Lienhardt. Deuxième édition, illustrée, 140 pages comportant 20 dialogues humoristiques et 850 questions et réponses. Prix franco: 48 F
- Amuzaj dialogoj en Esperanto, comme ci-dessus, troisième édition, non illustrée mais avec traduction en chinois. Prix franco: 28 F
- Facilaj dialogoj en Esperanto de A.Lienhardt. 12 dialogues vivants en Espéranto et en français, pour apprendre rapidement à parler la langue internationale. Nombreuses questions et réponses didactiques complémentaires. Prix franco: le livret 34 F la cassette d'accompagnement 36 F
- Amuzaj legolibro en Esperanto de A.Lienhardt. 100 histoires et 2000 questions/réponses, qui permettent aux débutants d'apprendre facilement à parler l'espéranto. 2 cassettes d'accompagnement comportent l'enregistrement des 100 histoires. Prix franco: le livre 55 F la cassette 36 F

Veuillez passer vos commandes à notre trésorier: Sefo André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 146390 BALDERSHEIM.  
Fédération de l'Est pour l'Espéranto - CCP 19972-72 Nancy

# EMISSIONS DE RADIO EN ESPERANTO

## (audibles en France)

Les heures sont indiquées d'après l'heure d'hiver en France.

### TOUS LES JOURS

06.00-07.00 VARSOVIE 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz).  
 12.00-12.25 VARSOVIE 41.99 (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz).  
 16.30-16.55 VARSOVIE 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).  
 17.30-17.55 VARSOVIE 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).  
 21.00-21.30 PEKIN 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz).  
 22.30-22.55 VARSOVIE 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

### LUNDI

14.30-14.40 BERNE 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz).

### JEUDI

07.00-07.15 VATICAN 186m (1611 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz), 19.84m (15120 kHz).  
 14.30-14.40 BERNE comme lundi  
 22.25-22.35 TALLINN 290m (1035 kHz), 50.63m (5925 kHz); les premier et troisième jeudis du mois.

### SAMEDI

14.30-14.40 BERNE comme lundi  
 21.00-21.20 ROME 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz).

### DIMANCHE

10.20-10.30 TALLINN comme le jeudi précédent  
 10.20-10.30 VIENNE 48,74m(6155 kHz), 21.85m (13730 kHz).  
 21.00-21.10 VATICAN 570m (526 kHz), 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.10m (9645 kHz); jours de fête compris.

21.30-21.55 VIENNE 50.46m (5945 kHz), 48.74m (6155 kHz).

23.00-23.20 LA HAVANE 25,10m (11950 kHz), 19.80m (15155 kHz).

23.45-24.00 ZAGREBO 262m (1143 kHz).

A partir du 26 mars 1989 (l'heure d'été) les émissions de La Havane, Pékin, Rome, Varsovie et Vienne seront une heure plus tard. Les autres resteront à la même heure.

Vous pouvez écrire à ces radios aux adresses suivantes:  
 BERNE *Svisa Radio Internacia*, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Suisse.

ROME *Radio Roma*, Esperanto-fako, C.P. 320, I-00100 Roma Centro Corr., Italie.

PEKIN *Radio Pekino*, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Chine.

TALLINN *Eesti Raadio*, Esperanto-fako, US-200100 Tallinn, Estonio, Union Soviétique.

VARSOVIE *Radio Polonia*, Esperanto-redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pologne.

VATICAN *Radio Vaticana*, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italie.


VIENNE *O.R.F.*, Esperanto-fako, A-1136 Wien, Autriche.

ZAGREB *Radio Zagreb*, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavo.

LA HAVANE *Radio Habana Cuba*, Esperanto-sekcio, Apartado 70-26, La habane, Cuba.

De plus, les parisiens peuvent écouter chaque vendredi de 18 à 19h une émission bilingue de *Radio Esperanto* (145 rue Amelot, 75011 Paris, tél. 42 62 90 51) sur les ondes de *Radio Libertaire* MF 89,4 MHz.

A Toulouse, *Radio FMR* (9 bis, av. Frédéric Estèbe, 31200 Toulouse, tél. 61 22 64 22), spécialisé en musique rock, présente une émission en Espéranto en MF 89,1 MHz le mercredi de 13h à 13h30 et le samedi de 10h30 à 11h.



Procuration à envoyer éventuellement au remplaçant ou au Président: E. LUDWIG, 26 Rte de la Schlucht, STOSSWIHR, 68140 MUNSTER

ASSEMBLEE GENERALE ANNUELLE DE LA FEDERATION

===== PROCURATION =====

Dans l'impossibilité de participer aux travaux de l'Assemblée Générale de la Fédération Culturelle France-Est pour l'Espéranto dont je suis membre actif, je délègue à (nom et adresse)

qui assistera à ladite Assemblée tous pouvoirs pour délibérer et voter en mon nom sur les propositions soumises aux participants.


Fait à  
le

faire précéder la signature de la mention manuscrite  
"bon pour pouvoir"

Signature



# distra angelo



## KRUCVORTENIGMO

### HORIZONTALA

1 Osto(r) - parto de faruno(r). 2 Por altiri(r) - ofta sur la rozaarbustoj. 3 Kreskas sur malsekaj grundoj(r) - amuzi. 4 Pronomo - porkaĵo(r). 5 Fari(r) - malgranda mamulo(r) - pronomo. 6 Batali - insekto(r). 7 koboldo - malgranda blua floro(r). 8 Pronomo - matena perlo(r) - por movigi boaton. 9 Rando(r) - kvarlatero(r) - konjunkcio. 10 Plurjara herbo(r) - karakteriza maniero(r) - prepozicio.

### VERTIKALE

1 Osto(r) - sufikso. 2 Cefalopodo(r) - osto. 3 Oficiale deklari(r) - solida(r). 4 Metaltubo por kunigi ion - turni. 5 Sufikso - prefikso - bedaŭro(r). 6 Je la fino de ŝakludo - birdo. 7 Popollegendaro(r) - pronomo. 8 Numeralo(r) - en la biblio(r) - sufikso. 9 Floro - kaprica kutimo(r). 10 Pasero(r) - efiko(r).

## SILABENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj vorteroj malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

ak blo br co da dri ea er es fe id ila in io io ito jor ka ke ko kun la lo lo mi ne ni no no nov on ono op op pi raj sej sme smo ti uk ut vi

1	+ - - + - -	arĝente brila metalo
2	+ - - + - - -	insektomanĝanto
3	+ - - + -	fluvo
4	+ - - + - -	sukcese eviti
5	+ - - + - - - -	usona urbo
6	+ - - + - -	ago de pilkegludanto
7	+ - - + - - -	respubliko de Sovet-Unio
8	+ - - + - -	moviĝema bakteria
9	+ - - + - -	plej alta perfekteco
10	+ - - + - - -	venena herbo
11	+ - - + - - - -	malsaneca histo
12	+ - - + - - -	grandakvante naskanta
13	+ - - + -	efikdona, profitdona
14	+ - - + - - -	nekonvene, erare loki
15	+ - - +	narkota substanco
16	+ - - + -	rara gaso



1. En la komenco la Senkorpa Mistero kreis Volapükon. 2. Kaj Volapük estis senforma kaj kaosa, kaj mallumo estis en ĝi. 3. Kaj la Senkorpa Mistero diris: Estu lumo; kaj fariĝis Esperanto. 4. Kaj la Spirito vidis Esperanton, ke ĝi estas bona, kaj la Spirito apartigis Esperanton de Volapük. 5. Kaj la Spirito nomis Esperanton Eterna Tago, kaj Volapükon nomis Nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno - unu tago. 6. Kaj la Spirito diris: Estu firmaĵo en la lingvo. 7. Kaj la Spirito kreis tiun firmaĵon. 8. Kaj Li nomis la firmaĵon regula akcento. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la dua tago. 9. Kaj la Spirito diris: Kolektiĝu la reguloj gramatikaj en unu lokon, kaj aperu la firma grundo; kaj fariĝis tiel. Kaj la Spirito nomis la firman grundon Fundamento. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. 10. Kaj la Spirito diris: La Fundamento kreskigu verdaĵon, kiu naskas ĝojon, vortaron, kiu donas laŭ sia speco radikojn, kies semoj estas en ĝi mem, en la Fundamento. Kaj fariĝis tiel. 11. Kaj la Fundamento elkreskigis verdaĵon laŭ sia speco: verdan lingvon kaj verdan movadon, vortaron kaj arbon, kiu havas radikojn, kies semo estas en ĝi mem, en la Fundamento. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. 12. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la tria tago.

## SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ

**KRUCVORT-ENIGMO:** Poluri hien uri  
zamenhof liber pioĉ ar segbok elektr  
iski rangifer oro amur relo ke nei ark  
trair analitik dub stik ger vok horo  
mia kri elitro olein

**SILAB-ENIGMO:** fruktoj malpermesitaj  
estas plej bongustaj!

**FINJARA KONKURSO:** inter la 7 bonaj sol-  
voj ricevitaj, tiu de Sr° BARRIER (68

HOCHSTATT) atingis nin plej frue. Li do ricevis premie la verkon promesitan. gratulon!